# TEJO-aktuale: numero 328, 2012-08-05

## Renovigo de tejo.org

Karaj vizitantoj! Ne timu, ni ne ŝanĝis nian politikon pri multlingveco ;) Nuntempe en tejo.org daŭras rekonstruaj laboroj. Pro tio dum ankoraŭ kelkaj tagoj la tuta paĝaro povas aspekti iom strange. Ni invitas Vin reveni ĉi tien iam baldaŭ, kiam tejo.org denove fariĝos plene uzebla. Se Vi urĝe bezonas iun informon, kiu nuntempe nefacile troveblas, bonvolu mesaĝi al oficejo ĈE tejo.org. Ni kore dankas pro Via pacienco!

## Pretiga seminario por Retkampanjo kontraŭ maltoleremaj parolaĵoj - 10-12 oktobro, Strasburgo, Francio

Partoprenu al seminario por retkampanjo kontraŭ maltoleremeco! En 2013 okazos eŭropa retkampanjo kontraŭ maltoleremeco. Por jam pretigi tiun eventon estas organizita de la 10a ĝis la 12a de oktobro seminario en Strasburgo, en kiu vi povas reprezenti TEJO-n aŭ vian landan sekcion! Se vi interesiĝas skribu al oficejo ĉe tejo.org, ĝis la 13a de septembro, dirante kial vi ŝatus partopreni. Tuj poste ni kontaktos vin dirante ĉu TEJO subtenos vian partoprenon, kaj vi povos tiam oficiale kandidatiĝi. Legu pli: http://tejo.org/hate-speech

## PREMIOJ DE FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI

Fondaĵo Antoni Grabowski (FAG), starigita antaŭ pli ol dudek jaroj dank' al donaco de s-ro Adam Goralski, celas subteni la Esperantan kulturon. Ĝi aljuĝas premiojn kaj subvenciojn meze ĉiun duan aŭ trian jaron. En la Hanoja UK estis anoncitaj la ĉi-jaraj premioj.
Premion de 650 usonaj dolaroj ricevis la elstara figuro de la Esperanta kulturo, specife beletro, la nederlanda intelektulo Gerrit Berveling. Premion je la sumo de 500 usonaj dolaroj ricevis la Esperanto-aranĝo ARKONES. (Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 465, 2012-08-05) Legu pli:
http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=465

## [Klaĉ-Kunveno Post Somera - KKPS 2012] Finfine la PosAmiko aperis en la reto!

*Malsukcesa elŝuto.*

## Invito al BAVELO-Seminaro en Kastelo Ortenberg, Germanio 21.9.-23.9.2012

Granda areo, granda kastelo, granda programo, Esperanto-kunveno, kie vi estas?

Kelkaj lokoj restas en ĉi tiu jara BAVELO-seminario en Kastelo Ortenberg.

Por komencantoj, progresinto kaj tre "bonaj", estas por ĉiuj ĉi tie.

Speciale alloga por ĉiuj komencantoj estas la komencanto-kurso kun la internacie konata Cseh instruistino Tereza Kapista el Beogrado. Vi ekparolas Esperanton, eĉ antaŭ ol vi rimarkis, ke vi lernis ion. BAVELO decidis helpi partoprenantojn en ĉi tiu kurso kun aparte alta rabato: La tuta semajnfino inkludante loĝado en la kastelo, manĝon kaj kompreneble kurson kostos nur 40 €, por junuloj nur 30 €.

Pliaj kulminoj estas:

- Per la Segway, la "starveturilo" tra Strasburgo. Ni sukcesis ricevi oferton rajdi por nur 50 €.

- Kiu el vi iam estis al Pecha Kucha Nokto? Kio tio estas kaj kiel ĝi funkcias, vi spertos tie.

- Tiu ĉi kaj multe pli vi spertos, kiam vi venos.

Por pliaj informoj kaj aliĝo: http://esperanto-bw.de/pages/eo/bavelo-arangoj/bavelo-seminario/invito.php?lang=EO

## IEK2013 en Saint-Amand-Montrond, Francio, 20a ĝis 26a de julio 2013

Aliĝilo por IEK'13 (Internacia Esperanto-Konferenco) en Saint-Amand-Montrond, Francio havebla: http://www.kava-pech.cz/iek

### Historio de Esperanto? Iru al Esphist!

Hodiaŭ mi fondis la retliston Esphist pri la historio de Esperanto: http://groups.google.com/group/esphist

Pro teknikaj kialoj mi devis peti ke homoj translokiĝu de la antaŭa, tre sukcesa grupo Ehist (yahoogroups) al tiu ĉi nova Esphist.

Kore salutas, Ziko van Dijk.

### [Esperanto] La dua albumo de la kolekto ĴomArtaĵoj

La dua albumo de la kolekto ĴomArtaĵoj, "La Arĝenta albumo" ĵus aperis ĉe Vinilkosmo-elŝutejo.
http://www.ipernity.com/blog/vinilkosmo/404305

### [Esperanto] Kiel parto de nia klopodo por plibonigi tutmondan komunikadon ĉirkaŭ la mondo

Ni invitas vin kunlabori en internacia projekto. Ekde nun ĝis la 20a de septembro, homoj el pli ol 86 landoj respondos 4 demandojn pri iliaj personaj vidpunktoj rilate al plibonigo de la mondo. Poste, tutmondaj artistoj kaj muzikistoj kreos artaĵojn surbaze de niaj respondoj al tiuj demandoj.
Ni volas ke ili aŭdu ankaŭ la voĉojn de la esperantistaro! Helpu nin movigi la mondon! Respondu niajn kvar demandojn aŭ informiĝu pli pri la projekto pere de la sekva ligilo: http://www.abigproject.org/esperanto

### Venontaj renkontiĝoj

28-aj ARtaj KONfrontoj en ESperanto, Poznano, Pollando, 21a ĝis 23a de septembro, http://arkones.org/

JEB renkontiĝo en Belfast, 29a kaj 30a de septembro, Belfast, Britio, http://jeb.org.uk/next_event/eo

2a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA), Kaub, Germanio, 30a de septembro ĝis 5a de oktobro 2012
http://www.esperanto.de/gea/ema2012.html

KoKoLoRES - la ludo-semajnfino, Schwerte, Germanio, 3a ĝis 7a de oktobro, petra.dueckershoff ĉe esperanto.de

13a KEKSO, Potsdam, Germanio, 19A ĜIS 21A DE OKTOBRO 2012
http://www.esperanto.de/gej/kursoj/kekso/aliĝilo.php?lingvo=eo

Lingva Festivalo, Ĉeboksary/Ŝupaŝkar, Rusio, 20an kaj 21an de oktobro 2012 http://www.lingvafestivalo.org aŭ Massimo info ĉe esperanto21.org

Komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj, Kastelo Greziljono, Francio, 27a de oktobro ĝis 3a de novembro, http://www.gresillon.org/autune

Klaĉ-Kunveno Post Somera - KKPS, Delft, Nederlando, 2a ĝis 4a de novembro 2012
https://www.facebook.com/events/256141727826605/ kaj http://klaĉkunveno2012.wikispaces.com/hejmo (atentu: c x estas ĝusta retadreso)

29a IF, Dortmund, Germanio, 27a de decembro 2012 ĝis 3a de januaro 2013 http://www.internacia-festivalo.de

Novjara Renkontiĝo / NIS, Xanten, Germanio, 27a de decembro 2012 ĝis 3a de januaro 2013
http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#alighilo

4-a Junulara E-Semajno, Naumburg, Germanio, 28a de decembro 2012 ĝis 4a de januaro 2013,
http://www.facebook.com/junularaesemajno kaj http://www.jes.pej.pl

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu